

- AM Herculis.-Astrophys. J., 213, L115.
- Heck A., Manfroid J., Mersh G. (1985): On Period Determination Methods. *Astronomy & Astrophysics Suppl.*, 59, 63.
- Jurkevich I. (1971): A method of Computing Cyclic Phenomena. - *Astrophysics & Space Science*, 13, 154.
- Kornejčuk N.P. (1984): *Splajni v Teorii Približenja*, Nauka, Moskva.
- Krilov V.I. (1959): *Približennoe Vičislenie Integralov*, Fizmatgiz, Moskva.
- Laurent P.J. (1972): *Approximation et Optimisation*. - Hermann, Paris.
- Marraco H.G., Muzzio J.C.(1980): An Improved Method to Derive Periods of Cyclic Phenomena. - *Publ. Astron. Society Pacific*, 92, 700.
- Marčuk G.I. (1980): *Metodi Vičislitel'noj Matematiki*, Nauka, Moskva.
- Pelt J.E. (1980): *Ĉastotnij Analiz Astronomičeskikh Vremennih Rjadov*, Valgus, Tallinn.
- Picchio G. (1981): Minimum of Light Curves from a Spline-Smoothing Technique. - *Astronomy and Astrophysics*, 94, 52.
- Stečkin S.B., Subbotin J.N. (1976): *Splajni v Vičislitel'noj Matematike*. - Nauka, Moskva.
- Topoljanskij D.B., Krilova T.V. (1977): *Priloženija Kubičeskikh Splajnov dlja Približenno Rešenija Graničnih Zadač*. - Dnepropetrovsk.
- Vondrak I. (1969): A Contribution to the Problem of Smoothing Observational Data. - *Bull.Astron. Inst. Czechoslovak.*- 20, 6, p. 349.
- Zavjalov J.S., Kvasov B.I., Mirošičenko V.L. (1980): *Metodi Splajn-Funkcij*. - Nauka, Moskva.

**IMPERATIVOJ DE LA KULTURO KAJ EDUKADO
EN LA EVOLUO DE
LA HUMANITARA PENSADO DE LA PERSONECO**

VLADIMIR I. IONESOV (RU)

La sciencteknika progreso kaj la nuntempa reorganizo de la mondo kausis premantan ŝarĝon senprecedencan en la historio je la konscio de la homo kaj starigas al la edukado la neordinarajn demandojn: trovi kaj ne perdi la homecon en la homo kaj turni ties unikan kulturindividan potencialon en la direkton de konstruktiva kultura kreado. Alegorie rimarkis Morton Hunt: "Enigma de la homa naturo ekzistas en tio, ke la homo povas agi simile al diabloj de la infero, sed ankaŭ simile al anĝeloj de la ĉielo" (1990, p. 226). Kiun rolon la edukado povas ludi en eltrovado de la homo, en realigo de ties unikaj kreoplenaj kapabloj kaj en konfirmo de la kreivaj personecaj bazoj en la kultura evoluo de la socio?

Unu el la plej gravaj premisoj por la solvo de tiuj demandoj estas kultura identigo de la personeco, t.e. maksimume ebla kunigo de la individuo kun ties persona interna esenco, elstarigo de la naturaj kapabloj de la personeco, ĝia emancipigo for de ĉiuj egaligaj unuformeckaj kaj stereotipa ŝablonoj (Ionesov, 1993).

Bazo de ĉia individuigo kaj kreado estas la libereco de la elekto. Unikeco de ĉiu homo kiel personeca neripetebla fenomeno premisas, ke

ĉirkau ĝi ekzistas, latente sed tamen evidente, personeca spirita kaj psikologia spaco, kiu formiĝas surbaze de ĝia individueco. En tiu spaco ekestas talentoj, kapabloj, intereso, celoj, deziroj, bezonoj, kiu elradias kaj estas karakteraj por ĉies individua natuo.

La problemo de libereco de la elekto ĉe la kogniva lernproceso estas antaŭ ĉio problemo de la libera eliro de la individuo en sian spirite personecan spacon. Se maleblas tiu ĉi eliro la persono fariĝas misantropa kaj ĝia individueco subevoluiĝas, velkas kaj subiĝas al eksteraj stereotipajoj de la konduto.

La libereco de la elekto en la edukada proceso determiniĝas ankau per la rilato de la personeco kun tiu spirita-psikologia spaco, en kiu sole la personeco povas intelekte realiĝi. Tio signifas, ke la nepra kondiĉo de la memrealiĝo de la homo devas iĝi la tuteco de ĝia personeco, kiu elradias el ĝia spirita-psikologia spaco. Tiu spaco kreiĝas per la evoluo de la individuaj kapabloj kaj bezonoj surbaze de la personeco.

Sekve, en la eduka laboro de la pedagogo kun la lernantoj necesas rimarki du fundamentajn principojn:

- la pedagogo devas diferencigi kiel eble plej frue la lernantojn laŭ iliaj individuaj inklinoj por emfazi en ĉiu lernanto ties egon, devas ekvidi en tiu ego la pozitivajn fortojn por la konstruo de ties personeco, devas subteni la ekskluzive naturajn kapablojn;
- nur postkiam la lernantoj jam estas formitaj kiel persono laŭ individuaj inklinoj (intereso, deziroj, gustoj, valoroj) oni rajtas krei por la infanoj tian individualismon, kiu adekvate aktualigas ilian esencon.

En tiu multmezura spaco ĉiu lernanto libervole okupas sian individuan celospacon, en kiu li laŭgrade komencas realiĝi siajn naturajn

kapablojn kun maksimuma sukceso. Rezulte de tiu libera personigo naskiĝas la plej riĉa varieco de la individuaj karakteroj. La kreado kaj interago de la personecoj fariĝas fonto kaj forto de intelekta perfektigo de la individuo; ĉefa instrumento de alproksimiĝo de "si inter si" iĝas la kreado de ĉies personeco. Tiu kreado estiĝas la konstrua maniero de aktiva disvolviĝo de la unikaj kapabloj de ĉiu individuo kaj signifas iliaj aktualiĝo enkadre de la ekstera mondo.

Tiu modelo respondas al la koncepto de la "altruisma egoismo" de Hans Selje, kanada psikologo; okazas kvazau dua, spirita-intelekta naskiĝo de la individuo.

La kreanta flanko de la mem-alproksimiĝo de la personeco komenciĝas tie, kie la kapabloj de la homo palpe trovis, kvazau divenis siajn punktojn de aplikado en la spaco de la vivo. "Vi poste ĝuos vian rajton naskiĝi homo, vi estos la mastro de viaj emocioj, de via ego kaj de via racia menso. Tio estos unu el la plej grandaj aferoj, kiun iu homo povas fari. Estas bele pentri majstrajn pentraĵojn, konstrui altajn konstruaĵojn au verki famajn novelojn. Fariĝi la mastro de vi mem estas eĉ alta kontribuo ne nur al vi mem, sed al la homaro. Kaj de tiu ĉi momento via ekstera atingo estos pli agordita al la energio-fluo de la mondo" (Keyes, 1988, p. 124).


Tie, kie libere evoluigitaj kapabloj de la personeco ĝuste tuŝas la klavojn de la vivo kaj estas kulture identaj al ili, naskiĝas en la vivo la krea kaj agordita muziko, belo, paco, harmonio. Sed tie, kie la personeco estas disduigita, kie estas perdita ĝia spirita-psikologia spaco, kie ĝi estas elvicigita el la propra ego kaj subigita al eksteraj fortoj, kie la kapabloj de la homo ne koincidas kun la "klavoj" de la vivo - tie neeviteble naskiĝas

falsaj sonoj, aperas sociala disharmonio, kaoso, detruo. Nur en la unua kazo eblas diri lau M. Heidegger, ke "homo kaj estado estas konfidentaj unu al la alia" (1991, p. 74).


Nur la libera personeco en la libera kreado povas reale kogni kaj ekposedi sin mem kiel en la spaco, tiel ankaŭ en la tempo. La tasko de la edukado estas eble plej frue trovi kaj evoluigi la naturan talenton de la personeco kiel ilon de la plimultigo kaj nobligado de la vivo. Interagado inter la pedagogo kaj la lernantoj devas krei la nutran terenon por la interna liberigo de la personeco for de la peza ŝarĝo de la socialaj stereotipoj. Tio eblas nur, kiam pedagogo kaj lernanto rigardas unu la alian kiel egalrajtajn partnerojn, malfermitaj unu al la alia por viva krea komunikado kaj havantaj la komunan celon: kognado de la vero. Ĝuste en la momentoj de la malfermiteco, unueco, konfido, komparado kaj reciproka simpatio vekiga la autentikaj naturaj talentoj de la homo. "La pedagogo devas ĉiam serĉi tiujn magiajn momentojn por interesigi kaj liberigi la gejunulojn. La vojo al akiro de tiuj ĉi momentoj kuŝas trans la koron" (Kudsk, Mathiesen, 1993, p. 6).

Distingado de sia krea potencialo nepre kondukas al serĉado de la vojoj de ilia ebla aplikado en la vivo. Kogni sin signifas kogni tion, kiun vi povas plenumi en la socio konforme al via natura talento. Kogni sin signifas sukcese elteni la fortegan atakon de kontraupersonecaj fortoj. Kognado de sia individueco kondukas al kognado de la ekkono, ke via individueco povas esti realigita nur en la kondiĉoj de la personeca emancipiĝo de aliaj homoj: "Ĉiu el ni troviĝas en diversaj ŝtupoj de la spirita kresko, depende de la cirkonstancoj de sia vivo. Serĉante la trafajn (bonajn) ecojn en aliaj homoj ni kuraĝigas ilian evoluon kaj kontribuas

samtempe al nia propra spirita kresko" (J. Huddleston, 1989, p. 417). Ju pli forte estas evoluita la individueco de la homo, des pli forte estas ĝia bezono kontaktiĝi kun aliaj individuecoj, des pli necesa unu individuo al la alia estas, des pli riĉa kaj varia estas la vivo liberigita de la dogmoj, rutinoj, ŝablonoj kaj aliaj kontrauvivaj strukturoj. Ju pli multaj estas tiuj ĉi personecoj, des pli multe evoluigas la vivo, movado, krea libero, renoviĝo. Tial oni ne povas ne konsenti kun maksimumo de B. Vogelmann: "Agu tiel, ke la direkto de via vivo ĉiam estu en konkordo kun la konservo kaj altiĝanta evoluo de la vivo" (1989).



Cikla sistemo de interagado de kreado kaj socia praktiko.
Kreado kiel rezulto de kunligo de la individuaj kaj universalaj homaj valoroj en la personeco.



Formado de la krea personeco en la edukada proceso.

La vojo de la nova scio al la nova konscio kaj de la nova konscio al la kreado de nova vivo.

LITERATURO

1. HEIDEGGER, M., Razgovor na proseloĉnoi doroge, Moskva, 1991.
2. HUDDLESTON, J., The Search for a Just Society, Oxford, George Ronald Publishers, 1989.
3. HUNT, M., The Compassionate Beast - What Science is discovering about the human side of humankind, New York, William Morrow and Comp. Inc., 1990.
4. IONESOV, V.I., Cultural Identity and Self-Consciousness in the Peace-Education, International Peace-Pedagogical Newsletter, 1 (June), Denmark, 1993, p. 18-20.
5. KEYES, K., Handbook to Higher Consciousness, 5th Ed., Loveline Books, Coos Bay, OR., 1988.
6. KUDSK, L. and MATHIESEN, L., Poetical Teaching - A Vision, International. Peace-Pedagogical Newsletter, 1 (June), Denmark, 1993, p. 3-7.
7. VOGELMANN, B., La Nova Realismo - La Konsekvenco de la Nova Pensado, Antwerpen, Flandra Esperanto-Ligo, 1989.

La aŭtoro estas lekcianto en la Samara Instituto de Artoj kaj Kulturo.

Adreso de la aŭtoro: D-ro Vladimir I. Ionesov
 P.O.Box 9406
 RU - 443115 SAMARA
 RUSLANDO